

Miaj rimarkoj, per kiuj mi provis konvinki miajn kontraŭulojn.

Principo, laŭ kiu mi tradukis: "Kaj la bona stilisto, konscienca tradukanto certe ne kontentiĝas je laŭsenca, skema traduko, sed klopodas reprodukti ankaŭ la stilapartaĵojn, la aromon de la originalo". K. Kalocay: Lingvo Stilo Formo, p. 49, eldonjaro 1931.

Paĝo unua: formo sen "ĉu vi estas" estas pli viveca, krom tio konforma al la originalo. Ne estas erara, kvankam mankas la demanda vorto "ĉu". Rigardu Fundamentan Krestomation, 1922, p. 161, linio: 5, 7, 24, 31. Rig.: Wüster, EW, p. 142, dekstre, linio: 7.

Paĝo dua: "Jes, mi estas la advokato ..." iom naiva respondo en la buŝo de advokato. Krom tio mankas la artikolo antaŭ la vorto "interesojn". Unua eraro.

"malpure", ĉu por alilingvano nekomprenebla?

"lin" egale bona kiel "al li". Fundamenta Ekzercaro: §18.

"Mi ne valoras heleron..." Akcentante la vortojn "ne" kaj "tiel", la frazo estas bone komprenebla - laŭ mia opinio; tamen mi konsentas, ke la korektita frazo estas eble pli facile komprenebla.

"preni" advokaton; ĉu vere korektenda?

"estas malbela, ke vi ne volas pacigi..." estas simpla konstato. Kun "se" la frazo ricevas kondiĉan karakteron. Tiam ĝi devus teksti: Estus malbela, se vi ne volus...

"el" aŭ "en" estas ambaŭ ĝustaj, sed la originalo tekstas "el".

"Kiel vi nomas?" Rig. Christaller, Deutsch-Esperanto Wörterbuch, p. 234 dekstre, linio 12 "nomi iun stultulo." Dua eraro.

"Ne saltu en la parolon", ĉu nekomprenebla por alilingvano? (Springen Sie mir nicht in die Rede: tre ofte uzata frazo).

Paĝo tria: "alie" estas dusenca same kiel nia ĉeĥa "jinak": nome: sice (germane: sonst) kaj: jiným způsobem (anders-auf eine andere Art und Weise). "Alimaniere" estas unusenca kaj ĝuste en nia ekzemplo ĝi ne povas anstataŭi la simplan "alie". Tria eraro.

"jen ĉion". La vorto "jen" faras al esp-istoj ofte malfacilaĵojn, same kiel "ja". "jen" estas la traduko de la rusa "vot", kiun la rusoj tre ofte uzas. En la ĉeĥa kaj germana lingvo mankas plenvalora ekvivalento por tiu ĉi treege praktika vorteto kaj pro tio oni ofte evitas ĝin. Ĉu prave?

Paĝo kvara: "mortturmenti": laŭ: mortpafi, mortbati. Ĉu la adverbiala formo "morte" en la korekto estas ĝusta? Estas ja diferenco inter: utrápiti kaj do smrti trápiti.

Paĝo kvina: "admoni" ĉu ĝi ne rilatas al la senco de la frazo pli bone ol "voki?"

"Tio frapis miajn okulojn aŭ orelojn" signifas fariĝi atenta kaj pro tio ĝi ŝajnis al mi tro malforta. La turmentiga karaktero de frapi ne ŝajnis al mi sufiĉe forta, pro tio mi uzis "bati".

"Kromhonor" laŭ: krompago, kromvaloro k.t.p. La vorto "krom" supozas en la vortoj normalan valoron, honoron, pagon. La vorto "speciala" ne havas ĉi tiun sencan: ekzemple ringo povas havi a/ valoron de oro, b/ kromvaloron kiel arta objekto, c/ specialan valoron kiel heredaĵo. Specialan valoron povas havi objekto eĉ tute senvalora: alumina ringo, kiun la soldato mem faris sur batalejo. Kaj tiun ĉi normalan honoron postulas ankaŭ Kalivoda.

"ĉiam-ĝis nun".

"verŝu": mia eraro kaŭzita de la germana: Schütten Sie die Farbe aus.

"Elflugi": ĉu vere nekomprenebla? "elkuri el" ĉu vere pleonasmo, kiel asertas s-ro Bednář? Letěl ze stáje kaj vyletěl ze stáje: kiel oni do tradukas ĉi tiun nuancon?

"ĉio ĉi" ne sufiĉus?

Paĝo sesa: "Vin kun via aĉa edukeco. . ." La korektantoj ne komprenis la frazon kaj komparas la edukecon de homo kun la edukeco/!/ de ĉevaloj! Krom tio: ĉu edukeco/edukiteco/ kaj eduko estas samsencaj? Laŭ mia opinio ĝi estas en tiu ĉi frazo eraro.

"buŝego": kial ne? /originalo: huba /

"mi kreviĝos" estas eraro. Rigardu: Vortaro de KABE: bombo krevas.

Kvara eraro.

"tiame" laŭ: tiama, tiamo. Kvankam la adverbia senco estas entenata jam en tiam, tamen ĝi estas por esprimi la kontraston de la originalo tro malforta. /Laŭ mia opinio/
"Kune kun" komparu kun la frazo: Venu kune kun la patro /§ 4, FE/.
"eĉ" estas superflua, ĉar la akcento kuŝas sur "ĉevaloj" kaj "pajlo"
"gastejo"n ankaŭ mi vizitas sed ne drinkejon /formanka/.
"bruto", en originalo: hovado. Kial ne "bovaĉo"?

Tre estimata samideano,

jen kiel mi defendis min, tamen sensukcese. Ili simple rigardis mian defendon kiel naturan elturniĝon. Eĉ sinjoron Ŝamla, kiu estas spite al sia juneco (vizitas la IV. klason de Kom. akad.) bona esp-isto kaj s-inon Strejčková (patrino de Ŝ.) mi ne sukcesis konvinki. (Ŝ. estas la aŭtoro de "kreviĝi" kaj de la frazo, kiun parolas la advokato) Despli malmulte mi sukcesis ĉe la malpli bonaj.

Certe mi ne pretendas, ke mi ne faras erarojn en espo. Min ekscitis nur la maniero, kiel oni korektis mian laboron sen mia konsento kaj kiel ili kontraŭ mia protesto faris, kio plaĉis al ili. Tion ni opinias ĝusta kaj tiel ĝi restos. Se temus ekzemple pri du egale bonaj esprimmanieroj, kies maniero estus la decida, la prefero de la tradukanto aŭ de iu ajn homo, kiu hazarde parolas la rolon antaŭ la mikrofono?

Sinjoro doktoro, por ŝpari al vi laboron, kiun kaŭzus detala respondo, bonvolu respondi tiujn ĉi tri frazojn, ĉar ĉirkaŭ ili turnis sin nia disputo: 1) Ĉu demanda frazo sen "ĉu" aŭ demanda vorteto estas senkondiĉe malĝusta kaj kontraŭfundamenta eraro? 2) Ĉu estas eraraj la frazoj: mi "kreviĝos", "Kiel vi nomas" kaj ĉu estas eraro la mankanta artikolo en la ruĝe skribita frazo sur paĝo 2. 3) Kiun laboron vi preferus, la korektitan aŭ la nekorektitan?

Mi atentigas, ke la korektoj per nigra inko estas de mi. Por traduko mi havis la saman ĉeĥan ekzempleron sed sen la krajone skribitaj rimarkoj kaj korektoj.

Mi petas vin ankoraŭ foje pardoni la kaŭzitan tedon kaj dankas al vi jam antaŭe por via afabla respondo.

Bratislava 27.V.1933.

Kilián, prof.
v T ř e b í ĉ i.

Vážený pane kolego,

Váš dopis z 8. V. 1935,

četl jsem se zájmem Váš překlad i názory o potřebě jeho oprav. Poněvadž si velice cením Vaší práce, rozvažoval jsem dosti dlouho o meritě i formě sporu. Dovolte, abych byl zcela upřímný. Jsem tím povinen právě významu, jehož jste po právu nabyli v našem hnutí.

Tedy po prvé. Divím se upřímně, proč jste se cítil dotčen změnami, jež korektor provedl ve Vašem překladu. Nesporně se nejednalo o opravy chyb nýbrž o jiný způsob vyjádření, a kterému dáti přednost, závisí od individuálního rozhodnutí překladatele. Opravu skutečnou provedl korektor po mém soudu jedinou, na 2. straně, nahradiv Vaše por ke spojkou se. Tu skutečně Váš překlad zlepšil.

Korektor Vašeho překladu je zřejmě velmi dobrý znalec esperanta. Měl-li za úkol, aby Váš překlad prohlédl a opravil, je samozřejmé, chtěl-li a měl-li se nějak uplatnit, že musil navrhnouti jiné slovní znění všade, kde to bylo možné. Kdyby byl navrhoval jen tam, kde to bylo nutné, nebylo by co měnit. Ale jeho návrhy Váš překlad nezhoršily. Ačkoli je Váš překlad úplně správný, snažil se korektor podle mého odhadu o to, aby byl při poslechu z radia co nejsrozumitelnější. Proto asi dal všade v tázacích větách ĉu. - Kdyby se jednalo o překlad pro knihu, dal bych přednost Vašemu překladu /doslovnému/ první a dalších otázek soudcových. Protože však hra byla určena pro poslech bez možnosti viděti jednající osoby, nahradil korektor Vaši stručnou otázku rozvláčnějším Ĉu vi estas. Pro hovor na jevišti nebo pro knihu byla by formulace korektorova horší než Vaše, pro hru do

radia zdá se mi jeho formulace lepší, protože srozumitelnější. Tvrdí-li však někdo, že korektor svojí opravou opravil Vaši chybu, může se jednat jen o zlou vůli.

Některé detaily;

" Jes mi estas advokato . . " souhlasím s Vaší poznámkou.

Malpure je lepší než malinde, je to doslovnější a přece ve spojení kalumnii zcela srozumitelná figura.

Mělo by býti pro srozumitelnost, "Kia estas Via nomo?" Ovšem "Via nomo?" je stručnější, ale je obava, zda otázku bude v radiu slyšeti, když mluví ochotníci hlasů necvičených.

Ne saltu . . proč by nemohlo zůstatí ? Souhlasím s Vámi.

Alie je též správné (ale dává se přenost alimaniere) ve slohu, který chce byti přesný. Protože se jedná o řeči lidí málo vzdělaných, zdá se mi, že alie právě svou nepřesností a hybridností lépe vystihuje formu překládané rozmluvy.

Mortturmenti. Znamená: utrápí mne k smrti. Li turmentos min ĝis morto znamená: bude mne trápit až do smrti (mé nebo jeho). Ĝis morte turmentos, jak navrhuje korektor, nezdá se mi vůbec správné. Ĝis má jediný význam "až do " časově i místně a je to buďto předložka nebo spojka; lze je tedy spojovati se substantivem nebo slovesem nebo s nesklonnými částicemi označujícími čas nebo prostor, ale sotva kdy s adverbem.

Admonas: snad je to výstižnější, vokas je zase prostší, nelze rozhodnouti, který výraz by byl spíše na místě.

Bati la orelojn. Snad to skutečně lépe vystihuje bolestivost těch řečí. Jistě to lépe vystihuje primitivnost stěžovatele než běžné frapis la orelojn; v tom už je nuance překvapení. Okulfrapa je běžné slovo.

Kromhonoru je lepší než speciala honoru právě pro svou neobvyklost. Patrně si je utvořil stěžovatel připravuje se k řeči u soudu jakožto slovo zvláštní, pregnantní. Ovšem herec bude je museti vysloviti krom-honoru. Váš rozbor je zcela správný.

Elflugis. Korektor má pravda. Nejlepší překlad by byl Bednářův kuregis nebo elkuregis. Flugis ve významu rychle se pohybovati po zemi není v esperantu běžné. V Plena vortaro všechny příklady / 12 / pro přenesený význam týkají se pohybu nad zemí nebo pochodu myšlenkového.

Hontu má býti bez Vin, jinak je Váš překlad správný.

Krevas bombo, veziko, pafilo, pneŭmatiko; krevi povas eĉ kranio pro abundeco de scioj.

Nikdy nemůže býti kreviĝi. Ovšem ale krevigi, na př. nukson, ŝtonon per pulvo. Kreviga malvarmo, la ŝtonoj krevas pro ĝi.

ĉio ĉi se toleruje v básnické mluvě. Ale bude je nutno asi tolerovati i v imitaci mluvy lidové, právě pro stručnost.

Buŝego. Též nevím, proč by nevyhovovalo pro huba.

Kune kun je zcela možné. Váš příklad je velmi případný.

Drinkejo není vhodné. Gastejo je každý hostinec, tedy též formanka. Drinkejo je buď "zapadák" nebo "bar"; tu je však přidati luksa, komfortega a podobně.

Dal bych přednost: pruvi al vi - ale pardonu vin.

Mám-li znovu resumovati svůj soud o Vašem překladu, musím říci, že zcela vyhovuje, místy je velmi dobrý, a že opravy, které provedl korektor, zřejmě dobrý znalec esperanta, nebyly nutné, někde překlad zlepšily, ale někde též zhoršily přílišným lpěním na gramatické správnosti. Pochybují však o zlé vůli toho korektora, spíš se mi zdá, že opravoval z přílišné horlivosti. Ale tu je těžko v našem případě vyhlásiti za chybu.

Používám této příležitosti, abych Vás srdečně pozdravil jakožto horlivého našeho spolupracovníka a smím-li si dovoliti radu, neberte si takové příhody, jako byly opravy ve Vašem textu tak k srdci. Kvalita Vašich výkonů je zřejmě taková, že pro jejich hodnocení nepadá na váhu spor o několik detailů v překladu.

V dokonalé úctě

Dr. Stan. Kamaryt,
předseda Svazu ĉsl esperantistů.

Estimata sinjoro direktoro!

Bonvolu afable korekti sekvantajn esprimojn, pri kiuj niaj samideanoj disputas. A. tradukas, B. korektas jene:

- | | |
|---|--|
| 1. A. Sinjoro N? | B. Ĉu vi estas sinjoro N?
Pli bone ol "A" |
| 2. malpure insultis
malĝusta laŭvorta traduko | "... malinde (malhonorige)..."
Pli bone ol "A" |
| 3. ... vi ne volas pardoni lin? | ... ĉu vi ne volas pardoni al li?
Pli bone ol "A" |
| 4. Mi ne valoras heleron por
ke mi tiel lasu insulti min
sensenca, laŭvorta traduko | Mi valorus eĉ ne unu heleron, se
mi tiel lasus insulti min
Pli bone ol "A" |
| 5. ... mi prenis advokaton | mi venigis advokaton
Pli bone ol "A" |
| 6. Via nomo? | Kiel vi nomas?
Pli bone: Kiu estas via nomo? |
| 7. Ne saltu en la parolon
sensenca, laŭvorta traduko | Ne interrompu
Pli bone ol "A" |
| 8. Ĉu vi diris jen ĉion? | ... ĉion ĉi tion
Pli bone: Ĉu vi finis vian parolon? |
| 9. Li mortturmentos min | ... ĝis morte
Ĉi tiu frazon mi ne povas kritiki,
ne havante la originalon |
| 10. Li senĉese batas miajn
orelojn (per insultoj)
malĝusta, laŭvorta traduko | ... frapas miajn orelojn
Pli bone diri vive:
Li turmentas mian aŭdon. |
| 11. mi ne postulas ian kromhonoron
ne kutima kaj nebela esprimo | specialan (apartan) honoron
Pli bone ol "A" |
| 12. Sed ĉiam vi ankoraŭ ne diris | Sed ĝis nun vi
Pli bone ol "A" |
| 13. li elflugis el la ĉevalejo
malĝusta, laŭvorta traduko | ... elkuris el la ...
Pli bone ol "A"
mi tradukus: elkuregis |
| 14. Mi krevos (de kolero) | mi kreviĝos
Pli bone ol "A" |
| 15. instigita de ĉi dommastro | ... de ĉi tiu ... Pli bone ol "A" |

16. kion la atestantoj povas pruvi vin

pruvi al vi
Pli bone ol "A"

Mi intence ne skribas la nomojn de la disputantoj samideanoj, ĉar iu povus eble oponi, ke via juĝo poste ne povus esti senpartia.

Dankante jam antaŭen por via afabla servo mi respektplene salutas Vin kaj restas Via sincera

15/3 1933

Al sinjoro
Josef Bednář
direktoro de komerca lernejo
Brno, Dobrovského 16

Frant. Válka
K. P. Masarykova 21

Tre estimata samideano,
mi plenumas vian ŝatatan demandon kaj resendas al vi la korektitan leteron. Kritikinte ambaŭ tradukojn, ŝajnas al mi, ke "A" estas komencanto en esperanto kaj "B" progresinta, sperta esperantisto. - Neniam oni devas traduki laŭvorte, kiel faras "A", tradukinte ekzemple malbone la frazon: Neskákejte do řeči – Ne saltu en la parolon!, sed ĉiam oni devas reprodukti la sencon de l' frazo, kiel bone korektis "B" kaj trafe tradukis: "Ne interrompu mian parolon!"

Kiam oni tradukus laŭ la maniero de "A", neĉeĥaj esperantistoj tute ne komprenus la enhavon. La rezulto estus sensecaĵo, kiu similus al la ilustrita frazeologio, regule publikigata en "Národní politika", "Jak si Pepíček Nohejlů představuje na př. rčení: "Maloval mu straku na vrbě." Lia imago: "Sur la arbo sidas makulkolora bovino kaj desegnisto pentras ĝin."

Sincere kaj kore salutas vin
Josef Bednář